# Cullera (Valencio)



## 74-a Hispana Kongreso de Esperanto

**De la 1-a ĝis la 3-a de majo de 2015**

Dum la semajnfino de la 1-a al la 3-a de majo de 2015 okazis en la urbo Kujero (Cullera), de la Valencia Regiono, la 74-a **Hispana Kongreso de Esperanto**. Partoprenis en ĝi proksimume 90 personoj, plejparto hispanaj, sed estis ankaŭ geesperantistoj el aliaj landoj: Germanio, Francio, Finnlando, Ukrainio, Polujo, Vjetnamio, Koreujo kaj Usono.

Kiel kutime en tiutipaj aranĝoj, la programo de la renkontiĝo inkludis tre diversajn aktojn: kulturaj, distraj, artaj, turismaj… Interalie, estis en ĝi muzik-koncerto, Esperanto-kurso, ekspozicio de esperantaĵoj (antikvaj leteroj interŝanĝitaj de geesperantistoj). La devizo de la Kongreso estis: **NOVAJ PERSPEKTIVOJ**, per kiu oni volis esprimi la celon pripensi kaj esplori novajn eblojn por la denuna laborado favore al la disvastigo de nia internacia lingvo dank al la t. n. "novaj teknologioj" de (inter)komunikado kaj al la kreskiĝanta deziro de la homoj de la novaj generacioj transsalti la lingvajn kaj kulturajn barojn.

Inaŭguris la kongreson la urb-konsilantino pri kulturo de la urbestraro, Maria Carmen Tormos, kiu kun la respondeculo de la Loka Kongresa Komitato, Enric Baltasar, kaj la prezidanto de **Hispana Esperanto-Federacio**, José Antonio del Barrio, bonvenigis la kongresanojn. Ankaŭ salutis vizitantoj devenantaj el landoj ekster Hispanio, kaj membroj reprezentantoj de grupoj kaj landaj asocioj. Krome oni donacis por la urba biblioteko kelkajn E-librojn.

La 2-an de majo, matene, okazis piedira ekskurso tra belega monta promenejo al monto el kiu oni povas ĝui la panoramon super la urbo Kujero, la valo de la rivero Júcar, la maron Mediteraneon kaj la marbordon ĝis la Kabo La Nao en la provinco Alikanto. Sur tiu monto oni vizitis la kastelon de Kujero kaj oni partoprenis en prelego pri astronomio. Alia ekskurso okazis la 3-an de majo al Valencio.

Kelkaj kulturaj programeroj estis la prelego de Tonyo del Barrio, prezidento de **Hispana Esperanto-Federacio** pri Donkiĥoto kaj Esperanto, de Flama Floro pri Vietnamio kaj de Heroo pri Koreujo, kaj de Javier Romero pri Nova monda kulturo kaj Esperanto. Aliaj temis pri kreado de kantoj kaj ret-katalogo de Biblioteko Juan Régulo. Dimanĉe matene okazis la asembleo de **Hispana Esperanto-Federacio**.

